

Mai-juin
Majo-junio
2011

Esperanto la verda stelo

94

ASSOCIATION
ESPÉRANTISTE
Dumonata revueto
numero 67

esperanto94.info

KALENDARO

CONGRES ET RENCONTRES DANS LE MONDE ENTIER ET PLUS PRES DE NOUS EN EUROPE

U.K à Copenhague
au Danemark du
23 au 30/07/2011

À Bouresse (Poitou)
stages d'été
www.kvinpetalo.org

LERNU à
Nitra en
Slovaquie
30/7 au 7/8

S.A.T. à Sarajevo en
Bosnie-Herzégovine du
30/7 au 6/08/2011

En Bretagne à
Plouezec
du 13 au 20/08/2011

À Grésillon (Baugé)
stages d'été
<http://grezijono.org/>

Toute l'année, et particulièrement au moment des vacances, l'été, il est possible d'apprendre l'espéranto ou de se perfectionner

Nous comptons sur vous pour venir applaudir la Chorale « INTERKANT' qui chantera en espéranto à Paris le 19 juin 2011 à 15 h 30 en l'église Notre Dame de la Croix 69, rue de Ménilmontant 75020 PARIS



Entrée libre : voir en page 4

Signez la pétition !



<http://esperanto-au-bac.fr>

Rendez-vous mensuel de l'espéranto

Pour parler en espéranto, « essayer » de parler, apprendre des notions de base auprès d'espérantophones de tous niveaux, s'informer et informer les autres (pour ceux qui s'y connaissent) à propos de l'espéranto, feuilleter des publications diverses et montrer celles qu'on possède soi-même, enfin se distraire et boire un pot ensemble : nous contacter.

(voir p.6)

La langue équitable

<p>p. 2 Congo, enseignement de l'espéranto p. 3 L'Espéranto et étude des langues. Elèves « Internet ». p. 4 Bulletin européen ; Concert Interkant' à Paris. p. 5 Malédiction de Babel. Chants occitans en espéranto. p. 6 Visites en Val de Marne. Café espéranto. p. 7 Ceux qui étudient avec « lernu » p. 8 Aux amoureux des chats. Amis du monde entier.</p>	<p>p. 2 Kongo, instruado de Esperanto. p. 3 Esperanto kaj studo de lingvoj. Retaj lernantoj. p. 4 Eŭropa bulteno. Koncerto « Interkant' » en Parizo. p. 5 La malben Babela. Okcitanaj kantoj en esperanto. p. 6 Vizitoj en Val-de-Marne. Esperanto-kafejo. p. 7 Tiuj, kiuj studas per «lernu ». p. 8 Al katamantoj. Amikoj el la tuta mondo.</p>
Imprimerie Spéciale	
Poŝtadreso :LA VERDA STELO – ESPERANTO 94 3 Rue Pablo Picasso Appartement 507 94600 Choisy le Roi Francio / France	Prezidanto : Tereza Sabatier : terezasa@club-internet.fr Sekretariino : Sylviane Lafargue Redaktorino : Tereza (☎01.45.76.10.57) Kasisto : christianvacheron @free.fr Korektanto : Vito Sendanto : Oktavio

La Anoncetoj

KONCIZA RAPORTO PRI NIA AGADO EN 2010	NOVA ADMINISTRACIA KONSILANTARO 2011
<ul style="list-style-type: none"> Multaj agoj en 2010 kiel la Rendevuo de la libro, en Choisy le Roi, nia partopreno en la departementa festo pri la akvo, kaj kelkaj aliaj budoj dum la komunumaj festoj en Champigny, Choisy, Ormesson... Iuj staĝis en Saint Raphaël kaj Pluezec, aliaj partoprenis kongresojn en Kubo kaj Sofia. Sen forgesi la ĥorogrupon « Interkant' », kiu koncertis en Bouresse kaj Kubo. La bulteno, estas regule eldonita ĉiun dumonaton, alterne, ĉu nigra, ĉu kolore. La kursoj kunigas 12-15 lernantojn, je la 1a kaj 2a gradoj. La raportoj pri la agadoj kaj financoj estis aprobitaj je la plimulto. 	<ul style="list-style-type: none"> - SABATIER Thérèse Ormesson Présidente - LAFARGUE Sylviane Choisy-le-Roi Secrétaire - VACHERON Christian Champigny-sur-M. Trésorier - MILLASSEAU Michel Champigny/M. Membre/Bureau - PICHARD Elisabeth Maisons-Alfort Membre /bureau - BARRAUX Nathalie St Maur - BOURDON Martine Champigny-sur-Marne - CASANOVA Aurore Villecresnes - CASTELLVI Octavio Choisy-le-Roi - LAFARGUE Henri Choisy-le-Roi - ROSSIGNOL Claudine Choisy-le-Roi
CONGO : ENSEIGNEMENT DE L'ESPERANTO	EN KONGO PRI INSTRUADO DE ESPERANTO
Grâce à un bienfaiteur italien, en mémoire à son épouse, une école « Complexe scolaire ANNA PAOLIZZI » a été construite à Kinshasa. Selon le contrat, on y enseigne l'espéranto. L'école a ouvert ses portes en septembre 2009 et les cours d'espéranto ont commencé en novembre. 	Danke al iu bonfaranto el Italio kaj memore al lia edzino, lernejo " Lerneja Komplekso ANNA PAOLIZZI " estis konstruita en Kinŝaso. Laŭ la kontrakto, oni instruas esperanton. La lernejo malfermis siajn pordojn en septembro 2009 kaj la esperanto-kurso komenciĝis en novembro. 
Il a été prévu d'enseigner l'espéranto aux enseignants du complexe, qui à leur tour l'enseigneront à leurs élèves. C'est une expérience sérieuse de l'espéranto à l'école ! (Selon informations internet de Jean Bosco Malanda)	Estas planite unue instrui esperanton al la geinstruistoj de la komplekso, kiuj siavice instruos al siaj gelernantoj. Estas serioza sperto en Kongo pri la instruado de esperanto en lernejo ! (Laŭ retaj informoj de Jean Bosco Malanda)


RIONS UN PEU	NI IOM RIDU
A une heure du matin, un ivrogne essaie d'introduire sa clé dans un réverbère. Un policier, faisant sa ronde, arrive et lui dit : - N'insistez pas. Personne ne loge là-dedans. - Mais si, regardez, il y a de la lumière au premier étage.	Je la unua frumatene, drinkulo provas enmeti sian slosilon en stratlanternon. Policisto, kiu patroladas alvenas kaj diras : - Ne tiom zorgu ! Neniu loĝas ene. - Jes ja ! Vidu estas lumo ĉe la unu a etaĝo !



L'ESPERANTO FACILITE L'ETUDE DES LANGUES	ESPERANTO FACILIGAS LINVOLERNADON
<p>Beaucoup d'expériences prouvent que l'espéranto s'apprend plus vite que les autres langues, de plus son étude facilite aussi l'apprentissage de ces langues :</p> <ul style="list-style-type: none"> • 1925 – 1931, Columbia University, New York, USA : 20 heures donnent un meilleur résultat que 100 h de français, allemand, italien ou espagnol. • 1947 – 1951 : Grande Bretagne (et 1948 à Manchester): un enfant apprend autant d'espéranto en 6 mois, que de français en 4 ou 5 ans ; après quelques mois d'étude de l'espéranto, les élèves avaient un meilleur niveau dans l'étude des autres langues. • 1958 – 1963, en classe d'été, en Finlande : le Ministère de l'Education a constaté qu'après des cours d'espéranto, les élèves avaient atteint un meilleur niveau en allemand, que les élèves, qui n'apprenaient que l'allemand, même depuis plus de temps ; • 1970 – expérimentation réalisée par le professeur Istvan Szerdahelyi à Budapest. Des enfants ont étudié en premier l'Espéranto puis après , le russe, l'anglais, l'allemand ou le français. On constata un résultat supérieur : russe 25%, allemand 30%, anglais 40%, français 50%, sur ceux qui n'avaient pas appris l'espéranto 	<p>Multaj eksperimentoj pruvas ke esperanto lerniĝas pli rapide ol la aliaj lingvoj, sed plie ke ĝia lernado ankaŭ faciligas tiun lernadon.</p> <ul style="list-style-type: none"> • 1925 - 1931, Kolumbja Universitato, Novjorko, Usono: 20 horoj da E-o donas pli altan rezulton ol 100 horoj da franca, germana, itala aŭ hispana studo. • 1947 - 1951, Ŝefildo, Britio (ekde 1948 ankaŭ en Manĉestro): infano lernas tiom da Eo dum 6 monatoj, kiom da franca lingvo dum 4 - 5 jaroj ; post iom da monatoj de E-o oni akiras pli bonajn rezultojn en la lernado de aliaj lingvoj. • 1958 - 1963, mezlernejo de Somero, Finnlando: sub kontrolo de la Ministrejo pri Instruado oni eltrovis, ke post E-kurso la lernintoj povis atingi pli altan nivelon pri la germana lingvo ol tiuj, kiuj lernis nur la germanan, eĉ se pli longe. • 1970 - Eksperimento efektivigita de prof. Istvan Szerdahelyi en Budapeŝto. Klaso de infanoj lernis unue Esperanton kaj poste, dispartiĝinte, lernis ĉu la rusan, ĉu la anglan, ĉu la germanan, ĉu la francan. Liaj konstatoj estis, ke la rusan oni lernis je 25% pli sukcese ol se oni ne estis antaŭe lerninta Esperanton; la germanan je 30%, la anglan je 40% kaj la francan je 50%.

RECOMMANDÉ AUX ELEVES « INTERNET »	REKOMENDINDA AL E-LERNANTOJ ...
<p><i>Et pas seulement à eux !</i></p> <p>Bien qu'il soit possible se s'exercer à la prononciation de l'espéranto par la radio sur le Net, cela ne donne que la possibilité d'écouter sans voir l'écrit.</p> <p>Maintenant, l'Autrichien Anton Oberndorfer a créé « NA » -Radio Esperanto-, par laquelle il propose chaque jour un court exposé sur des thèmes divers, en ajoutant le texte écrit à la bande son avec l'avantage sur la page internet d'y trouver le texte écrit. C'est très efficace pour s'exercer à la prononciation.</p> <p>On peut écouter et lire la Radio Espéranto sur le Net à :</p> <p style="text-align: center;">http://members.aon.at/aldone/retradio/</p> <p>Dans l'émission du 16 avril 2011, il traite de son souvenir, lui qui parlait déjà l'espéranto depuis 25 ans, de l'expérience d'écouter « Radio Pologne » en 1994. Cela lui fit prendre conscience de certains détails de prononciation. Il devint un adepte de « Radio Pologne » avec qui il correspondait régulièrement ; lui rendit même visite en 1998.</p>	<p><i>kaj ne nur al ili !</i></p> <p>Kvankam pere de la esperantaj retradioj eblas ekzerciĝi pri la prononco de esperanto, ili donas nur la eblecon aŭskulti tekstojn sed sen ebleco vidi ilin skribitajn.</p> <p>Nun la Aŭstro Anton Oberndorfer kreis « NA » -Esperanta Retradio-, en kiu li proponas ĉiutage mallongan paroladon pri diversaj temoj, aldonante al la sona aŭdado tiun tekston skribitan. Tio estas tre efika por ekzerciĝado de la prononco.</p> <p style="text-align: center;">Esperanta Retradio aŭdeblas kaj legeblas ĉe:</p> <p style="text-align: center;">En la elsendo de la 16a de aprilo 2011, temas pri memoraĵo de la aŭtoro, kiu jam parolis esperanton de 25 jaroj, pri lia sperto, kiam li aŭskultis ĉe „Pola Radio” en 1994. Tio konsciigis lin pri detaloj de la prononcado de la lingvo. Li fariĝis arda adepto de la elsendoj de „Pola Radio” kaj regule korespondis kun la redakcio ; eĉ vizitis ĝin en 1998.</p>

RIONS UN PEU	NI IOM RIDU
<p>Deux blondes visitent le Louvre à Paris et s'arrêtent devant une superbe statue d'Apollon, dont le seul vêtement est une feuille de vigne posée sur ses parties intimes. Après un long silence, l'une d'elles dit à l'autre - Tant pis...on reviendra en automne...</p>	<p>Du mirindaj blondulinoj vizitas muzeon « Luvro » en Parizo kaj ĉe belega statuo de Apolono, kies nura vestaĵo estas vita folio metita sur liaj intimaj partoj. Post longa silento, iu el la du diras al la alia - Ne gravas... ni revenos aŭtune...</p>



REVUE BILINGUE : ESPERANTO – FRANCAIS

NUMERO DE MARS DU BULLETIN EŬROPEEN n°103	MARTA NUMERO de EŬROPA BULTENO n° 103
En Esperanto sur Internet	Esperantlingve en la reto
http://remush.be/bulteno/	
<ul style="list-style-type: none"> • Association d'Espéranto de Malte (1961-2011) 50 ans cette année. • Sûrement le meilleur résultat de E° EU. • Conseil de Gestion à Bruxelles ; • L'Union européenne veut imposer l'usage de l'anglais sur les rivières européennes. • Un candidat au vote, fait de la propagande • Action intéressante à Strasbourg. • Qui veut la mort de la langue française ? • Moyens importants pour les élèves d'Internet. • 70e congrès espagnol à San Lorenzo de El Escorial. • Conférence multilingue : une langue, un pouvoir et la connaissance. • Programme du congrès d'Espéranto à Nowy Sącz. • Concert en direct avec présentation d'un nouvel album-cd « Rêverie » cd à IJF 2011. • En Allemagne, un cours de perfectionnement officiel d'Espéranto. • Nouveaux timbres-poste en Slovénie. 	<ul style="list-style-type: none"> • Malta esperanto-societo (1961-2011) ĉijare 50-jaraĝa. • Verŝajne la plej grava atingo de EEU. • Estrarkunsido en Bruselo. • Eŭropa unio devontigas uzon de la angla sur kontinenteŭropaj riveroj. • Kandidato en balotoj reklamas esperanton. • Interesa agado en Strasburgo. • Kiu volas la morton de la franca lingvo? • Grava eblo por retaj lernantoj. • 70-a hispana kongreso en San Lorenzo de El Escorial. • Konferenco: multlingveco: lingvo, povo kaj kono. • Programo de pola esperanto-kongreso en Nowy Sącz. • Viva koncerto kun prezento de nova kd-albumo "Revado" - dum la IJF-2011. • Ŝtate agnoskita esperanto-kleriga kurso en Germanio. • Novaj e-poŝtmarkoj en Slovenio

CONCERT D'INTERKANT' A PARIS	« Canto General »	Entrée libre
<p>À Paris, sous la direction de Franjo Lévêque,</p> <p align="center">le 19 juin à 15 h 30,</p> <p>en l'église Notre Dame de la Croix 69, rue de Ménilmontant 75020 PARIS</p> <p>avec l'oeuvre de Théodorakis sur des poèmes de Pablo Néruda (traduits en espéranto par G. Lagrange)</p>		<p>Ce sera le 7e concert public (Bouresse en Poitou, en 2009, Le Mans, Hillion en Bretagne, Kaiserslautern en Allemagne, la Havane à Cuba en 2010 et Toulouse en mars 2011)</p> <p>de la chorale que nous soutenons, qui regroupe des chanteurs espérantistes de chorales régionales et à laquelle certains de nos membres participent</p>


ATENTU !

Vi ne ricevis vian aliĝkarton 2011 ? Eble vi forĝesis pagi vian jaran kotizon ! Ne estas tro malfrue. Ne plu atendu, sendu vian kotizmonon (15 eŭroj aŭ pli) al la kasisto :

Christian Vacheron 142 avenue Roger Salengro 94500 Champigny/Marne. Dankon.

RIONS UN PEU	NI IOM RIDU
<p>Un enseignant reproche son mauvais travail à un élève :</p> <p>- Peux-tu me dire, pourquoi tu ne veux pas apprendre l'anglais ? Déjà la moitié du monde le parle !</p> <p>- Est-ce que cela ne suffit pas ?</p>	<p>Instruisto riproĉas malbonan laboron al lernanto :</p> <p>- Bonvolu diri al mi, kial vi ne deziras lerni anglan lingvon? Jam duono de la mondo posedas ĝin !</p> <p>- Ĉu tio ne sufiĉas ?</p>
	

LA MALEDICTION DE BABEL	LA BABELA MALBENO
<p>Nous avons commandé le dernier ouvrage en français d'André Cherpillod " La Malédiction de Babel". 65 pages d'arguments imparables. Tirage limité.</p> <p>En voici les chapitres:</p> <ol style="list-style-type: none"> 1) La Malédiction de Babel est quotidienne et multiforme. 2) Une langue, qu'est ce que c'est ? 3) C'est difficile les langues. 4 et 5) Les solutions actuelles. 6) On se plaint dans l'imaginaire. 7) L'anglais, langue facile ? 8) l'Union Européenne. 9) Tout cela coûte cher. 10) Comment fonctionne le cerveau ? 11) Une question de santé publique. 12) A la recherche de la langue parfaite. 13) La Malédiction de Babel , on peut y échapper. 14) Une désinformation intentionnelle. 15) Quelle est donc cette langue ? 16) Comment est cette langue ? 17) Une langue vivante.. 18) Que de chemin parcouru en un siècle ! 19) Faut-il apprendre l'espéranto ? 20) L'avenir de l'espéranto. 21) L'espéranto en chiffres. <p>Commandes à Christian Vacheron (voir en page 2)</p>	<p>Ni mendis la lastan francligvan verkon de Andreo Cherpiljodo « La malbena de Babelo ». 65 paĝoj da ne kontraŭeblaj argumentoj. Limigita kvanto.</p> <p>Jen la ĉapitroj :</p> <ol style="list-style-type: none"> 1) La malbono de Babelo estas taga kaj pluforma. 2) Kio estas lingvo ? 3) Malfacilas lingvoj. 4 kaj 5) Nunaj solvoj. 6) Oni kompezas en fantazio. 7) Ĉu la angla, facila lingvo ? 8) Eŭropa Unio. 9) Ĉio tio kostas multe. 10) Kiel funkcias cerbo ? 11) Demando pri publika sano. 12) Al serĉado de perfekta lingvo. 13) Oni povas eskapi al la Malbena de Babelo. 14) Intenca misinformado. 15) Kio, do, estas tiu lingvo ? 16) Kia estas tiu lingvo ? 17) Vivanta lingvo. 18) Kiom da progreso en jarcento ! 19) Ĉu devige lerni esperanton ? 20) Estonteco de Esperanto. 21) Ciferoj pri esperanto. <p>Mendojn al Christian Vacheron (vidu paĝon 2)</p>



CHANTS OCCITANS EN ESPERANTO	OKCITANAJ KANTOJ EN ESPERANTO
<p>Tatiana Loskutovan, enseignante russe de langues, dont l'espéranto, qui a séjourné en France pour l'enseigner et pour des visites (Grésillon, Vendée, etc.), informe que les éditions "Impeto", à Moscou, ont édité un recueil de chansons occitanes de Patric, auteur moderne, sous le titre "Okcitanaj kantoj en Esperanto" (Chants occitans en espéranto) compilés et traduits par Ludmila Novikova. Le recueil a été en vente lors de la Rencontre internationale méditerranéenne « IREM-2011 » de Sète, du 22 au 26 avril 2011.</p>	<p>Tatiana Loskutovan instruistino pri lingvoj, el kiuj esperanto," kiu restadis en Francio por ĝin instrui kaj por vizitoj (Greziljono, Vendee, ktp.), informas ke la eldonejo « Impeto » eldonis okcitanajn kantojn en Esperanto" de Patrik' (Patric), moderna aŭtoro sub la titolo « Okcitanaj kantoj en esperanto», kiu estas vaste konata en la suda parto de Francio. Kompilitaj kaj tradukitaj de Ludmila Novikova. La kantaro estis vendata dum aprila internacia renkontiĝo « IREM-2011 » en Sète, de la 22a ĝis la 26a de aprilo 2011.</p>



RIONS UN PEU	NI IOM RIDU
<p>Une femme regarde son mari planter un clou. - Chéri, ton marteau me fait penser à la foudre. - Vraiment ! Pour la rapidité ? - Non du tout, mais il ne frappe jamais deux fois à la même place !</p>	<p>Edzino rigardas sian edzon, kiu plantas najlon. - Karulo, via martelo pensigas min pri fulmotondro. - Ĉu vere ? Pro rapideco ? - Tute ne, via martelo neniam frapas dufoje saman lokon !</p>



VISITES EN VAL-DE-MARNE	VIZITOJ EN VALDEMARNO
<p>Ce guide est une parfaite illustration du fait que le Val-de-Marne est le département de l'eau par excellence. La première partie de cet ouvrage vous apporte des informations générales sur les enjeux de l'eau dans le Val-de-Marne, les caractéristiques des milieux naturels rencontrés, l'histoire, l'architecture et les activités liées aux multiples usages des rivières. Neuf itinéraires vous sont proposés ponctués chacun d'éclairages sur les aspects particuliers qui jalonnent ces promenades : ponts, ports, garages à bateaux, îles... Mais également sur les possibilités de visites de lieux culturels à proximité (musées, curiosités locales...). Faciles d'accès, ces itinéraires sont introduits par une carte donnant des repères utiles pour accéder rapidement à la dernière partie du guide toutes les informations pratiques pour profiter pleinement de vos escales en Val-de-Marne : idées de découvertes à faire seul ou en groupe, carnet d'adresses pour pratiquer toutes les activités nautiques et de loisirs liées à l'eau et enfin un agenda permanent des événements célébrant cette précieuse ressource.</p>  <p>http://www.cg94.fr/files/0604/temps_flaner.pdf</p>	<p>Tiu gvidlibro estas perfekta bildigo de la fakto, ke la Valdemarno estas vere la departemento de la akvo. La unua parto de tiu verko alportas al vi ĝeneralajn informojn pri la celoj de akvo en Valdemarno, la karakterizaĵoj de la tieaj naturaj medioj, la historio, la arkitekturo kaj la aktivaĵoj ligitaj je la multformaj uzoj de la riveroj. Naŭ itineroj estas proponitaj kun, por ĉiu, informoj pri la apartaj aspektoj, kiuj signas tiujn promenadojn : pontoj, havenoj, boatgaraĝoj, insuloj... Sed ankaŭ pri proksimaj eblaj vizitoj (muzeoj, lokaj vindindaĵoj...). Facile alireblaj, tiuj itineroj estas enkondukitaj per mapo donanta utilajn gvido-sigilojn por rapide atingi la priskribitan promenadon (metrooj kaj RER-stacidomoj, eblaj parkejoj).</p>  <p>La lasta parto de la gvidlibro donas ĉiujn praktikajn informojn por plene profiti de la Valdemarno : ideoj por ĝin malkovri kaj iri aŭ sole aŭ por grupe, adresaro praktiki ĉiujn akvajn aktivaĵojn kaj ripozamuzojn ligitajn je akvo kaj fine konstanta agendo pri eventoj laŭdantaj tiun valoregan riĉofonton.</p>

CAFE - ESPERANTO	ESPERANTO-KAFEJO
<p><i>Les deux niveaux du cours d'Espéranto de Champigny(1) ont participé au "Café-Espéranto". Le 13 avril, en assistant à la répétition du concert de Jacques YVART chantant Brassens (2).</i></p> <p>"L'événement était organisé par "Café-Espéranto". Le rendez-vous était à PARIS, dans le 20e, au café "Le Monelo"</p> <p>Jacques YVART a joué de la guitare accompagné de Famo(3) avec son accordéon. Le café étant très petit, nous sommes allés à trente dans une salle au sous-sol. La répétition du concert s'est déroulée dans une ambiance de café-concert. Jacques a raconté des anecdotes sur les chansons que Famo traduisait en français.</p> <p>Ce fut une très belle soirée". Nathalie</p> <p>Le public était assez jeune. Il aurait été mieux d'avoir le texte de quelques chansons. Le local trop petit, le bruit à l'étage, le va-et-vient dans l'escalier étaient un peu gênants. Pourtant nous avons passé une bonne soirée ; le temps a passé trop vite. . Elisabeth.</p> <p>(1) Cours de Champigny-sur-Marne. (2) Jacques YVART connaissait personnellement Brassens, qui l'incita à devenir chanteur. (3) Fabrice MORANDEAU est un chanteur qui se produit en solo et est soliste dans la chorale "Interkant".</p>	<p><i>La duanivelanoj de Ĉampini-kurso(1) partoprenis la "Eo-kafejon" la 13an de aprilo, kaj ĉeestis dum provludo -koncerto de Ĵak'Ivar' kiu kantis Brasensajojn (2).</i></p> <p>" La evento estis organizita de "Eo-Kafejo". Ni rendevuis en Parizo, en la 20a kvartalo, en la kafejo "le Monelo". Ĵak' Ivar' ludis gitaron kaj estis akompanita de Famo(3) kun sia akordiono. La kafejo estas tre eta, ni do tridekope iris en malsupran ĉambiron. La provludkoncerto disvolvis sin en kafkoncerta etoso. Ĵak' dividis kun ni anekdotojn pri la kanzonoj, kiujn Famo tradukis el Esperanto al la franca.</p> <p>Estis tre agrabla vespero". Natalio</p> <p>La publiko estis iom juna. Pli bone, se ni havus la tekston de kelkaj kantoj. La loko tro eta, la bruoj je la supra etaĝo, homtrafiko en la ŝtuparo iom ĝenis . Tamen ni ĝuis la vesperon ; la tempo pasis tro rapide Elisabeth</p> <p>(1) kurso de Ĉampinio (Champigny-sur-Marne). (2) Ĵak' Ivar' (Jacques YVART) konis persone Brasenson (Brassens), kiu decidigis lin iĝi kantisto. (3) Fabrico Morando (Fabrice MORANDEAU) estas mem kantisto, kiu ankaŭ koncertas solule kaj solistas en la ĥoro "Interkant".</p>

RIONS UN PEU		NI IOM RIDU
<p>-- Le sénateur a parlé pendant trois heures ! -- A quel propos ? -- Cela, il ne l'a pas dit !</p>	<p>-- La senatano parolis tri horojn ! -- Pri kio? -- Tion, li ne diris !</p>	

REVUE BILINGUE : ESPERANTO – FRANCAIS

CEUX , QUI ETUDIENT AVEC « LERNU ! »	TIUJ, KIUJ STUDAS PER « LERNU ! »
<p>SES-2011, Somera Esperanto-Studado (Stage d'été d'espéranto) aura lieu du 30 juillet au 7 août 2011, cette fois à Nitra.</p> <p>Cette quatrième rencontre « lernu ! » aura lieu de l'ouest km de capitale de la km de Vienne, l'Autriche et Budapest, Hongrie.</p> <div style="display: flex; align-items: center;">  <div style="margin-left: 20px;"> <p>organisée par lieu à Nitra, ville slovaque, à 90 Bratislava, Slovaquie, 160 capitale de 155 km de capitale de la</p> </div> </div> <p>Parties du programme :</p> <ul style="list-style-type: none"> - Matin - cours d'espéranto ; - Après-midi - excursions, conférences, travaux manuels, sport, travail en groupe, etc. ; - Soir - soirées nationales et internationales, concerts, films, discothèque... <p>Des enseignants expérimentés d'espéranto donneront des cours d'espéranto à des élèves répartis en 5 groupes selon leur niveau.</p> <p>L'équipe « lernu ! » s'occupera des activités du programme concernant lernu!. Il sera possible de prendre part à une présentation de lernu.net, du système de traduction du site, entre autres choses similaires. Vous serez invités à demander ou proposer tout ce que vous voulez savoir à propos du site web.</p> <p>Voir la galerie de photos « SES 2009 et SES 2010 »</p> <p>Voir aussi la petite vidéo, qui montre dans les grandes lignes le programme de l'édition 2010 de SES. Vous pourrez également regarder une vidéo sur SES 2008.</p>	<p>SES-2011, Somera Esperanto-Studado (somera staĝo pri esperanto) okazos de la 30a de julio ĝis la 7a de agosto 2011, tiun fojon en Nitro.</p> <p>Tiu kvara renkontiĝo organizita de « lernu ! » okazos en Nitra, urbo de okcidenta Slovakio, je 90 km de Bratislavo, ĉefurbo de Slovakio, 160 km de Vieno, ĉefurbo de Aŭstrio kaj 155 km de Budapest, ĉefurbo de Hungario.</p> <div style="display: flex; align-items: center;">  </div> <p>Partoj de la programo :</p> <ul style="list-style-type: none"> - Matene : esperanto-kurso ; - Postagmeze – ekskursoj, konferencoj, manlaboroj, sporto, grupa laboro, ktp. ; - Vespere : naciaj kaj internaciaj vesperoj, koncertoj, filmoj, diskoteko... <p>Eksperimentaj instruistoj pri esperanto instruos la lernantojn dispartigitaj en 5 grupoj, laŭ ilia nivelo.</p> <p>La skipo « lernu ! » zorgos pri la aktivaĵoj de la programo koncernanta « lernu ! ». Eblos partopreni prezentadon de « lernu.net », de la traduksistmo de la paĝaro, inter aliaj tiaj temoj. Vi estos invitiaj demandi aŭ proponi ĉion, kion vi deziras scii pri la paĝaro.</p> <p>Vidu foto-galerion de SES 2009 kaj SES-2010.</p> <p>Vidu ankaŭ videoaĵon, kiu montras la ĉefajn partojn de la eldono 2010 de SES. Ankaŭ eblas spekti videoaĵon pri SES-2008.</p>
UNE JEUNESSE ACTIVE A HANOÏ	JUNULARO AKTIVAS EN HANOJO,
<p>Le congrès international s'y tiendra en 2012. Maintenant je suis à Hanoï au Vietnam. Depuis le début je suis très surpris du niveau élevé ici. Beaucoup d'enthousiastes apprennent notre langue, et il y a d'autres candidats. Maintenant j'enseigne l'espéranto à deux groupes d'étudiants universitaires, à un groupe d'institutrices de jardin d'enfants (où aura lieu le congrès-enfants), à deux groupes d'âges divers. Puis j'enseignerai l'espéranto à un autre groupe d'universitaires. (Internet : Augusto)</p> <div style="display: flex; align-items: center;">  </div>	<p>La UK-kongreso en 2012 okazos tie. Nuntempe mi estas en Hanojo, Vjetnamio. Ekde la komenco mi ege surpriziĝis pro la alta nivelo de Esperanto ĉi tie. Multaj homoj entuziasme lernas nian lingvon, kaj ankoraŭ estas multaj kandidatoj por lerni ĝin. Nun mi instruas Esperanton al du grupoj de universitataj gestudentoj, al grupo, kiu konsistas el instruistinoj de infanĝardeno (kie okazos la Infana Kongreseto), al du grupoj de diversaj aĝoj, kaj tuj mi komencos instrui Esperanton al tria grupo de universitataj gelernantoj. (Internet : Aŭgusto)</p>
RIONS UN PEU	NI IOM RIDU
<p>-- Est-il vrai que l'on n'embauche dans les entreprises qu'après un test de niveau ?</p> <p>-- Oui, tout à fait.</p> <p>-- Et quel niveau faut-il avoir pour réussir ?</p> <p>-- Inférieur au niveau intellectuel du chef !</p>	<div style="display: flex; align-items: center;">  </div> <p>-- Ĉu vere, ke oni dungas en la firmao homojn nur post testado de la Intelekt-nivelo ?</p> <p>-- Jes, certe.</p> <p>-- Kaj kiun nivelon, oni devas havi por la sukceso?</p> <p>-- Pli malaltan ol la intelekt-nivelo de la ĉefo !</p>

L'ESPERANTO, UNE LANGUE COMMUNE POUR LES HOMMES

DE SUEDE, AUX AMOUREUX DES CHATS	DE SVEDIO, AL KATAMANTOJ
<p>Chers défenseurs des chats Chez nous en Suède, nous avons eu plus de neige que d'habitude et les chats préfèrent rester à la maison. Mais maintenant, il fait plus clair et la température, au moins le jour, est au-dessus de zéro. Selon la mesure officielle le printemps n'est pas encore arrivé avec des températures moyennes jour et nuit au-dessus de zéro et j'ai encore de la neige jusqu'au dessus des genoux, si je vais hors des chemins.</p> <p>Pourtant les oiseaux, chats, chevaux montrent qu'ils sentent le printemps et les hommes regardent le soleil espérant beau temps et belle nature. Les refuges d'animaux sont pleins de chats abandonnés, qui ont besoin d'un foyer.</p> <p>Le journal d'aujourd'hui demande que de nouveaux maîtres se fassent connaître. Il n'y a pas que les chats qui soient sans toit... <i>Le bulletin traite aussi de l'article d'une jeune japonaise sur le tsunami et le tremblement de terre et aussi sur la guerre en Lybie.</i> (note du rédacteur)</p> <p>...Revenons aux chats : comme d'habitude, ils sont capables de calmer un peu notre psychisme, et nous réjouir.</p> <p>Ingrid Näsholm <i>secrétaire de RondoKato.</i></p> <p>PS : si vous avez des questions sur « Ma ronde des chats » ou sur les chats, écrivez-moi : rondokato@hotmail.com . Et, si mes chats vous intéressent, voyez mon blog, en partie en espéranto, http://isrosens-bilder.blogspot.com</p>	<p>Karaj katbatalantoj, Ĉe ni en norda Svedio estis pli multe da neĝo ol kutime kaj la katoj preferis resti endome. Sed nun la tagoj ekheliĝas kaj la temperaturo, almenaŭ tage, superas nulon. Laŭ oficiala mezuro pri printempo, meza temperaturo tage kaj nokte super nulo ankoraŭ ne estis atingita kaj la neĝo ankoraŭ restas super miaj genuoj se mi iras ekster la vojetoj.</p> <p>Tamen birdoj, katoj kaj eĉ ĉevaloj klare montras ke ili sentas printempon kaj ankaŭ homoj rigardas al la suno kaj esperas baldaŭajn belajn veteron kaj naturon. Best-aziloj, tamen, estas plenaj de forlasitaj katoj, kiuj tiom bezonas hejmon.</p> <p>Hodiaŭa ĵurnalo petas, ke novaj prizorgantoj sin anoncu. Sed, ne nur katoj estas senhejmaj...</p> <p><i>La bulteno parolas ankaŭ pri artikolo de juna japanino pri cunamo kaj tertremo kaj ankaŭ pri milito en Libio</i> (noto de la redaktanto)</p> <p>...Ree pri katoj: kiel kutime, ili kapablas iom tranviligi nian psikon kaj ĝojigi nin.</p> <p>Ingrid Näsholm <i>sekretariino de RondoKato.</i></p> <p>PS :Se vi havas demandojn pri « RondoKato » aŭ pri katoj , skribu al mi : rondokato@hotmail.com . Ankaŭ, se vi interesiĝas pri miaj katoj vizitu mian blogon parte en esperanto http://isrosens-bilder.blogspot.com</p>



DES AMIS DU MONDE ENTIER	AMIKOJ EL LA TUTA MONDO
<p>L'article ci-dessus me donne l'occasion de parler des visites et des accueils, que permet la connaissance de l'espéranto.</p> <p>J'ai rencontré Ingrid et son mari lors d'un circuit en Suède. En chemin, nous avons fait étape chez eux et passé une soirée agréable pour se connaître. Une autre année, nous avons accueilli leur fille et son amie en voyage en France. Puis, le couple, sur le chemin de retour du congrès international à Montpellier.</p> <p>Grâce à notre langue commune il est très agréable de converser plus facilement avec des étrangers. De plus, l'espéranto apporte autre chose, appelée « idée interne », qui fait que dès la rencontre, on a l'impression de se connaître depuis longtemps.</p> <p>Nous voyagions en caravane, nous avons donc notre couchage, mais l'espéranto permet aussi d'être accueilli par des espérantistes, dont les noms et conditions, se trouvent sur un livret « Pasporta Servo », que nous vous avons déjà présenté (voyez le site : http://www.pasportaservo.org/) Tereza</p>	<p>La supra artikolo donas al mi okazon paroli pri la vizitoj kaj akceptoj, kiujn ebligas kono de esperanto.</p> <p>Mi renkontis kun Ingrid Näsholm kaj edzon okaze de rondvojaĝo al Svedio. Survoje ni haltis ĉe ili kaj vesperis agrable por interkonatiĝi. Alian jaron, ni akceptis ĉe ni ilian filinon kaj amikinson ŝian, kiam ili vojaĝis tra Francio. Kaj alian fojon la paron, kiam ili partoprenis la internacian kongreson en Montpeliero, survoje al reveno al ilia lando.</p> <p>Danke al nia komuna lingvo estas tre agrable konversacii pli facile kun fremduloj. Plie, esperanto alportas alion, nomita « interna ideo », kiu faras ke tuj okaze de la renkontiĝo oni povus pensi, ke delonge oni jam interkonatiĝis.</p> <p>Ni vojaĝis pere de ruldomo, do havis nian lokon por tranokti, sed esperanto ebligas ankaŭ esti akceptitaj de esperantistoj, kies nomojn kaj kondiĉojn eblas trovi en libreto « Pasporta Servo », kiun, ni jam prezentis al vi (vidu en la reto : http://www.pasportaservo.org/) Tereza</p>



RIONS UN PEU	NI IOM RIDU
<p>Le médecin d'un tyran convoque tous ses sosies. - Messieurs, j'ai deux nouvelles, une bonne et une mauvaise. La bonne : notre président est vivant, la mauvaise : il a perdu un bras !</p>	<p>Kuracisto de tirano kunvokas ĉiujn liajn soziojn. - Sinjoroj, mi havas du novaĵojn, bonan kaj malbonan. La bona : nia prezidento estas vivanta, la malbona : li perdis brakon !</p>

